

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: DELIO PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LASZLO ZINNER

JARABONO

BRAZILIO — Cr\$ 20,00
Eksterlande — U\$ 1,50
Aŭ 15 Respondokuponoj
Ekzemplero — Cr\$ 2,00

RIO DE JANEIRO, Julio, de 1948

JARO II

Monata eldono

N.º 16

Adreso: Caixa Postal 3677

Redakcio kaj Administrejo
Rua das Marrecas, 19, 2.º and
Telefona 22-5300

Esperantismo kaj Esperantistoj

Esperantisto estas ĉiu lerninto de la internacia lingvo, estu kia ajn celo por kiu li ĝin uzas. Tion difinis laŭ propono de Zamenhof mem, la Bulonja Deklaracio.

La komercisto uzanta Esperanton por sia komercado kaj la spiritisto por la korespondado pri metafizikaj studoj, estas ambaŭ esperantistoj. Ni rimarku, ke por multaj esperantistoj la esperantismo estas duagrada afero. Sendube ili rajtas esti tiaj, sed al ili oni ne povas fidi gvidadon de la kluboj kaj asocioj. La filatelisto aŭ katoliko kiu ellernis Esperanton nur por ke pere de ĝi li povu profiti siajn interesojn, ne taŭgas kiel gvidanto en nia movado. Gvidanto povas esti nur tiu, kiu metas esperantismen en la unua loko, kaj en la dua aliajn ideojn kaj interesojn. Vera esperantisto preskaŭ ne havas religion, ĉar la esperantismo ja estas por li kvazaŭ religio. Kelkaj eĉ tute ne havas religion, kaj tiuj estas la plej bonaj esperantistoj, ĉar ili tute sin dediĉas al la movado. Tiuj laboregas por la propagando kaj instruado de nia lingvo, aferoj kiuj estas la tuja bezono de nia movado. Oni propagandu kaj instruu Esperanton! La apogo de la oficialaj instancoj venos poste, kiel konsekvenco de nia nuna laboro. Ni bezonas fortan Esperanto-movadon, ĉar kiam ĝi estiĝos vere forta, ni sukcesos havigi al ni ĉion de la registaro sen ia peto. Sed por

(daŭrigo sur la 4.^a kolono)

SÃO PAULO ESPERANTA KLUBO



En sia ejo, sur la 21-a etaĝo de la konstruaĵo "Ameriko", en São Paulo, la estraro de la supre citita klubo (SPEK) kunvenigis, la 19-an de pasinta junio, la klubanojn kaj la simpatiantojn de nia movado omaĝi ĝian vicprezidanton, D-ro Hilário Dertônio kaj lia edzino, S-ino Zoraide Mattos Dertônio, kaŭze de ilia freŝdata geedziĝo.

Je la nomo de la estraro parolis direktoro de la Departamento pri Propagando kaj Kulturo, S-ro José Reganati, kiun oni vidas dekstre, sur la foto, kaj S-ro Newton Ceratti, prezidanto de la Klubo, priskribinte sian ĵus finitan vojaĝon tra sudamerikaj landoj.

Partoprenis la feston la geartistoj de la Klubo, gesamideanoj: Norma Guerrini, João Maziero, Flávio Gouvea, José Domingues de Moraes, Moisés Garcia Sobrinho, Francisco Angelo de Moura kaj Antônio Ramos kiuj prezentis diversajn kantojn, muzikaĵojn, deklamaĵojn kaj eĉ komedieton en Esperanto. Gaja balo sekvis la feston.

La ĉi supra foto, sur kiu oni povas ankaŭ vidi, eĉ la prezidanteca tablo, fraŭlinon Valdivia Riemma kaj la gesinjorojn Dertônio, estas pruntedonita al RIO ESPERANTISTA de la São Paulo'a tagĵurnalo, "A Gazeta", kiu efike kunlaboras kun niaj samideanoj en tiu ĉefurbo al ili disponigante paĝojn por la aperigo de notoj kaj raportoj pri la laboroj de SPEK.

(daŭrigo de la 1.^a kolono)

ke naskiĝu forta Esperanto-movado, ni devas propagandi kaj instrui la internacian lingvon. Post la instruado, nia celo devas esti; kunligi novajn samideanojn al nia movado, ekscii iliaj preferoj kaj interesigi ilin pri korespondado, librolegado, abono de la gazetoj kaj revuoj ktp. Kontraŭe, se ili ne uzos la lingvon, iom post iom ili forperdos la intereson kaj baldaŭ forlasos niajn klubojn, societojn kaj eĉ la movadon mem.

La laboro estas granda kaj por ĝi ni ne havas tempon fiksitan. Ni laboradu senĉese. Zamenhof tre klare diris al ni:

"L' espero, l' obstino kaj la pacienco, — Jen estas la signoj, per kies [potenco Ni paŝo post paŝo, post longa [laboro, Atingos la celon en gloro."

Sed por labori tiamaniere, ĝis atingi la celon, estas nepre bezona, ke la pioniroj forpuŝu aliajn ideojn al la dua loko kaj metu Esperanton sur la plej altan piedestalon. Tio estos tre profitdona, ĉar ili efektiviĝos, en si mem, altajn ideojn ĝis tia grado; ke ili restos unu tuto, nedisigebla unuo.

L' espero, l' obstino kaj la pacienco estas la ĉefaj ecoj de vera esperantisto, sed ne nur ili. Super ili li devas posedi grandan amon al ĉiu homo. Ke li sin sentu vera homo, ne pli granda ol la aliaj, tamen, ankaŭ ne pli malgranda. Li estu simple homo!

Jan kaj Griet

(KOLONJA LEGENDO)

Verkis Franz Kreutzberg.

En la 17-a jarcento parto de la loĝantaro de la urbo Kolonjo estis kamparanoj. Ĉirkaŭ la urbo troviĝis kampoj kaj eĉ vingardenoj. El tiu epoko venas la kolonja ŝercvorto "kolonja kamparano" kaj tiu kamparano estas signo de la urbo, ĉiujare prezentita dum la karnavalaj festoj kiel "kolonja kamparano kaj kolonja junulino".

En la jaroj 1618 ĝis 1648 furioziĝis milito en landoj germanaj. Soldatoj de diversaj nacioj batalis unu kontraŭ la alia. Ili militservis al tiu princo, kiu pagis kaj traktis ilin plej bone. Ofte la soldatoj forlasis iun princon pro pli alta pago, nomita "Sold", vorto el kiu devenas la germana vorto "Soldat".

Tiuepoke vivis en Kolonjo juna viro nomita Jan (nederlanda mallongigo de la antaŭnomo Johano - Joĉjo). Li estis servisto ĉe kamparana bieno; juna, forta kaj aminta la vivon. Volonte li laboradis sur la kampo kaj en la garbejo. Pro natura ĝojo li ĉiam kantis aŭ fajfis. En la sama bieno servis knabino kies nomo estis Griet (kolonja mallongigo de la antaŭnomo Margarete-Grinjo). Ankaŭ ŝi estis juna, gaja infano. Dum la laboro ŝi kantis kaj oni ĉiam povis aŭdi ŝian ridon. Ŝi estis helpema kaj afabla al ĉiuj kaj ĉiuj ŝin amis. Jan ekamis Griet'on. Li serĉis ŝin por ke li povu ŝin vidi kaj interparoli kun ŝi, ankaŭ lialportis al ŝi florojn kaj fruktojn. Griet akceptadis la donacojn kaj Jan pli kaj pli perdis sian koron. Li scipovis bonege labori, kanti, fajfi ktp., sed malkaŝi sian amon al juna knabino estis por li la tasko tre malfacila. Ofte li pripensadis sian paroladon, ofte li havis ŝancon paroli kun Griet sola, sed ĉiujfoje al li mankis la kuraĝo. Iun tagon, belegan dimanĉon, en printempo, Jan promenadis tra la kampoj, pensante pri la amatino. Subite li ekvidis Griet'on kiu sidis inter flo-

roj en herbejo rara bildo por Jan.

"Nun aŭ neniam" pensis li. Kuraĝe li alpaŝis al Griet kaj ŝin salutis. Ŝi afable respondis. "Kion nun diri? Kiamaniere komenci?" Bedaŭrinda Jan! Subite li ekparolis: "Kara Griet, mi amas vin! Ĉu vi volas iĝi mia amata edzino?" Dank'al Dio, nun la gravaj vortoj estis el diritaj. Jan ruĝiĝis, paligis kaj ektimis. Kian respondon diros Griet? Ĉu ŝi akceptos lin? Ŝi ja ĉiam parolis afable kun li, ŝi akceptadis liajn malgrandajn donacojn.

"Sed, sed — ŝi, la juna gaja, rava fraŭlino kaj li — simpla kamparana servisto! Sed li estas forta kaj, se Griet akceptos lin, li laboros duoble por la amata estulino". Griet estis surprizita: ŝi ne tuj povis respondi. Ŝi, la bela, gaja kaj juna Griet, edzino de malriĉa servisto? "Ho, Jan, vi ja estas nur simpla, malriĉa viro kaj mi estas bela junulino. Mia estonta edzo devas esti riĉa kamparano posedanta bovojn, ĉevalojn kaj porkojn!" Jan paligis: tion li tute ne atendis. La knabino kuraĝas lin moki? For de ŝi, for de Kolonjo! Li sin eksentis malfeliĉa kaj forkuris. Li ne revenis al la bieno.

Fiera Griet atendis plu, ke la riĉa amanto venu baldaŭ. Junaj viroj, kiuj venis, ne estis sufiĉe riĉaj kaj belaj. Kaj la jaroj forpasis. Neniu plu venis karesi Griet'on. Ŝi maljuniĝis kaj volonte edziniĝus kun simpla servisto, sed eĉ tia viro ne venis. Griet restis servistino ĉe kamparano ĝis kiam ŝia mastro ordonis al ŝi vendi liajn fruktojn kaj legomojn en la urbo. La urbo estis ĉirkaŭita de murego kiel protektilo kontraŭ malamikaj soldatoj. Tra diversaj pordegoj de tiu murego la stratoj de la urbo forkondukis al la kampoj kaj en la malproksimecon. Apud unu el tiuj pordegoj sidis, ĉiutage, maljuna Griet, en malriĉa vestaĵo. Multaj homoj preterpasadis ŝin kaj la mastrinoj venis

ALGARVE

Verkis Francisco Candido

El la dek unu portugaliaj provincoj Algarve estas la plej malgranda. Ĝi estas rektangula strio de tero limigita per la maro okcidenten kaj suden, per Hispanujo al oriento kaj la nordo per la montĉenaro kiu ĝin apartigas de la provinco Baixo Alentejo (Bajso Alemeĵo). montaro kies plej alta monto, nomata Feia (Feja), situacias proksime de la urbeto Menchique (Menŝike). La alto de tiu monto estas 903 metroj super marnivelo. De sur ĝi kaj de sur aliaj montoj elfluas kaj elsprucas diversaj fontoj kies akvoj estas, laŭloke, varmaj aŭ malvarmaj.

Apud Menchique estas banloko por la reŭmatismuloj kaj alispecaj malsanuloj kaj proksime de Alpertel, kiu estas ankaŭ urbeto staranta sur la montĉenaro, troviĝas sanatorio por la tuberkulozuloj.

La provinco Algarve estas 130 kilometrojn longa kaj 40 kilometrojn larĝa. Tamen, malgraŭ ĝia tre malgranda areo ĉi tiu provinco dividi-

ĝas je tri distingajn regionojn, nome: la marborda, la mezalta kaj la montara.

En la unua regiono estas kelkaj el la plej bele naturdotitaj marbordoj de la lando kiuj allogas ne nur la portugalojn, sed ankaŭ multnombrajn gefremdulojn, kiuj tie restas por sin bani en la maro, sin amuzi aŭ ripozi dum aŭtuno kaj vintro.

Sur ĉi tiu ebena regiono kreskas vinberujoj kaj pinarboj. El la mara avo oni ĉiujare eltiras grandan kvanton da salo. Inter la havenoj estas menciinda grava golfeto kiu prenas nomon de la apuda urbo Lages (Lajes).

La dua regiono estas ankaŭ ebenaĵo kie regas la figujo, migdalujo kaj karobujo. Granda, krom tio, estas la diverseco de la vegetaĵoj kiuj estas kulturataj en ĉi tiu regiono. Apud la bordoj de la riveroj estas belaj legomkaj florgardenoj same kiel la riĉdonantaj fruktarbaretoj kie kreskas, inter

(daŭrigo sur la 3.^a paĝo)

aĉeti ion. Venis ankaŭ la infanoj peti fruktojn senpage aŭ nur ŝagreni ŝin. Ili vokis la "pomo-Griet"on. Iun tagon, en aŭtuno, Griet, kiel kutime, sidis inter la fruktokorboj kaj trikis. Subite ŝi ekaŭdis militan muzikon antaŭ la pordego. Tio ne estis malofta okazaĵo ĉar la kolonjaj soldatoj ofte ludis muzikon kiam ili revenadis post la ekzercado. Sed ĉi tiu muziko estis stranga, fremda, neniam aŭdita melodio. Griet ne povis vidi kiu estis alvenanta kaj decidis elire ekster la murego, ĉar ĉiu, kiu estus eniranta la urbon, devus, tiamaniere, preterpasi ŝian vendejon. La muziko pli kaj pli alproksimiĝas, sonas pli kaj pli laŭte; jen la muzikistoj marŝas ĉirkaŭ la stratangulo kaj iras tra la pordego. Fremda oficiro en impona uniformo rajdas blankan ĉevalon malantaŭ la muzikistoj. Fiera viro kun brilantaj okuloj li estas kaj

tenas la spadon en la mano. Pro Dio! Kiu estas li? Ĉu vere? Ĉu estas Jan, la iama malriĉa kampservisto al kiu ŝi rifuzis ŝian manon? Ho, generalo li estiĝis! Jan rajdante tra la pordego, ankaŭ tuj ekkonis la knabinon kiu forpelis lin el la hejmo. Li haltigis la ĉevalon kaj eldiris: "Nu, Griet, kiu ja povus supozi tion?" La konsternita Griet nur povis balbuti: "Jes, Jan, kiu estus pensinta tion?"

Jan kiel eksficiro restis dumvive en la urbo. Pri Griet la legendo nenion plu rakontas. Sed la kolonjanoj kiu fieriĝas pri la famkonata generalo Jan van Werth, ilia samurbano, starigis monumenton kun fontano montranta la supre priskribitan epizodon ĉe la pordego. La monumenton oni starigis sur Altermarkt (malnova vendejo), kie la kamparanoj vendas siajn rikoltaĵojn.

A L G A R V E

(daŭrigo de la 2.^a paĝo)

aliaj, oranĝuloj, mandarinujoj, citronujoj, mespilujoj kaj granatuloj. Ĉi tiu regiono produktas ankaŭ grenojn ĉi-uspecajn. Dissemitajn sur la kampara oni vidas multnombrajn kalkoblanigitajn dometojn kun bluj strioj ĉe la anguloj.

Dum la monatoj januaro kaj februaro ĉi tiu regiono kaj la responda parto de la montara regiono vidigas al la vojaĝanto unu el la plej agrablaj panoramoj pro tio ke ĉi tiu suda provinco de sudlando ŝajnas kvazaŭ neĝokovrita kampo pro la disvolvigo de la floroj de la migdalujoj, kies puran blankecon oni ekvidas de malproksime.

En ĉi tiuj regionoj, por tiel diri, estas nur du sezonoj: printempo kaj somero. Ankaŭ la tria regiono ĝuas moderan klimaton; nur en decembro kaj januaro malvarmiĝas. Tie kreskas la korkarbo, kverko, verdakverko, kaŝtano, kelkaj karobujoj, la oleandro kaj arbutujo. El la beroj de ĉi tiu lasta oni faras tre ŝatatan kaj ŝatindan brandon. Ankaŭ diversaj arbedoj kaj arbustoj tie kreskas, El ĉi tiuj menciindaj estas la hortensioj kiuj donas belegajn, longedaŭrajn, diverskolorajn florojn.

La ĉefaj grenoj kulturitaj estas: tritiko, maizo kaj sekalo. En kelkaj lokoj, precipe en ĉirkaŭaĵoj de la urbeo Menchique, estas sufiĉe grandaj pomarboj kaj abunde kreskas rozuloj kaj violoj. Sur la montoj kaj valoj paŝtas aroj da kaproj kaj da pacemaj ŝafinoj. Inter la ŝarĝbestoj, laŭkvante, la azena speco okupas la unuan lokon.

En Algarve vivas birdoj kaj birdetoj diversspecaj. La kreado kaj prizorgado de la kortobirdoj fariĝis vera industrio. Grandaj kvantoj da kortobirdoj estas sendataj for ĉiusemajne, precipe al Lisbono kaj al Hispanujo. Oni ankaŭ eksportas grandajn kvantojn da ovoj.

La ĉefaj fruktoj eksportataj estas, laŭ la kvanto da

K O N S O L O

Theodor Fontane (1819 - 1898)

Konsoliĝu, ĉio pasas,
ankaŭ malfeliĉa hor';
kio nun vin embarasas,
intage fuĝos for.

En l' eterna ir' kaj veno
kuŝas ĉe l' dolor' la ĝoj';
ankaŭ de l' feliĉ' la beno
venos re sur via voj'.

Vivu kun esper-motivo
ĉe ajn iu horobat';
ŝanĝo estas leĝ' de l' vivo,
ŝanĝon portas nia fat'.

El la germana lingvo esperantigis Francisco V. Lorenz.

tunoj, la figoj, karoboj, migdaloj, kaŝtanoj, oranĝoj, granatoj, citronoj, mespiloj kaj mandarinujoj. Fajnojn, pizojn, tomatojn ktp. oni sendas multkvante ne nur al Lisbono, sed ankaŭ al aliaj urboj kaj urbetoj de la lando kaj al Hispanujo, ĉar en Algarve tiuj legomoj maturiĝas ĉiam pli frue ol ne aliaj provincoj.

La loĝantaron oni povas konsideri kiel dividita en tri grupojn: fiŝkaptistoj, terkulturistoj kaj fabriklaboristoj pro tio ke la tuto de la loĝantaro sin okupas en tiuj laboroj.

En Algarve ne okazas kiel en la meza parto de la lando, kie la homoj loĝantaj apud la maro estas duone fiŝkaptistoj kaj duone terkulturistoj. Tute ne! En Algarve la fiŝkaptisto estas nur fiŝkaptisto, la terkulturisto ne havas alian okupon krom tiu de terkulturado kaj la fabriklaboristo ne oficiiĝas en diferentan metion.

La ĉefaj industrioj estas: fiŝkaptado, fiŝkonservado, korkoellaborado kaj matofarado. La ceteraj, pro ilia negraveco, ne estas menciindaj. Tamen, estas tre interesaj hejmaj ellaboritaĵoj faritaj ĉu de la viroj ĉu de la virinoj, precipe la brodaĵoj, kolorigitaj palmaĵoj kaj la homaj, bestaj kaj birdaj figuroj faritaj el figoj kaj

P R O P A G A N D A J
G L U M A R K O J

Aperis du interesaj propagandaj glumarkoj. La unua kun bildo de la piramidoj kaj sfinksoj, kun araba kaj esperanta surskribo "Lernu Esperanton". La dua kun bildo de nia Majstro kaj arablingva surskribo "Lernu Esperanton la Internacian Lingvon — D-ro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto". La prezo por 100 glumarkoj estas nur 3 internaciaj respondkuponoj. Meudu ĉe D-ro Megalli. P.O.B. 1914, Kairo, Egiptujo.

migdaloj aŭ el figoj kaj pinuksoj.

Pro malaltaj salajroj kaj pro la senlaboreco kiu trafas grandan nombron da loĝantoj, la laborista klaso travivas pli mizeran staton ol en aliaj provincoj kaj granda nombro da viroj kaj eĉ da virinoj foriras kaj serĉas sian perlaboron en Maroko, suda parto de Francujo, en Brazilo kaj Argentino kvankam lastatempe la algarvanoj enmigras preskaŭ nur al la portugaliaj kolonioj en Afriko, precipe al Angolo.

(Finota).

N I A J K U L T U R K U N V E N O J

Dum la monato Junio okazis en nia Asocio, kiel kutime, la jenaj kulturkunvenoj. Je la 5a. gvidis la kunvenon S-ano Delio Pereira de Souza, ĉar S-ano Zinner forestis. La gvidanto paroladis pri la movado kaj la situacio momenta de nia Asocio. Sekve nia S-ano Antonio S. Varrão laŭtleĝis sian verkon titolita "Nie kruco". S-ano Oswaldo Rodrigues laŭtleĝis el Heroldo de Esperanto "Malpli da belaj frazoj, multe pli da argumentoj", intervjuo kun D-ro Ivo Lapenna.

Je la 12a. laŭtleĝis verkon senditan de argentina esperantisto S-ino Cedilha Neto. S-ano Roberto das Neves parolis pri lingvaj eraroj. Ĉi tiu samideano portis por plezurigi nin diskon kun esperanta enhavo. La diskon sendis S-ano Arnaldo Vianna el São Paulo: S-ano Délio faris interesan paroladon pri nia movado ĝenerale.

Je la 19a. S-ano Maria Angélica laŭtleĝis interesan artikolon nomata "La fortan volon" sendita de eŭropa s-ano. F-ino Regina Pereira de Souza laŭtleĝis "rakonto"-n, verko de Arlette C. de Souza.

Ankaŭ parolis en tiu kunveno nova S-ano José Moreira, lerninto de S-ano Wranka, pri la Ĉe-metodo kaj ĝia valoro por paroligi la lernantojn.

Je la 26a. la kunveno estis gvidita de S-ano Délio, kiu laŭtleĝis verkaĵon de S-ano Cyril Brandon, el Nov-Zelando, titolita "Malnova Historio pri la Maori'o".

Ĉiun urban esperantiston ni invitas ĉeesti kaj partopreni niajn kulturkunvenojn, ĉiusabate la 5an horon. Alilandaj samideanoj sendu interesajn verkaĵojn aŭ tradukaĵoj pri sia urbo kaj sia lando.

La aligo al "Universala, Ligo"
estas devo de ĉiu pachtalanto

Autobiografio de Eugenio Matwiejczuk, verkisto kaj nia kunlaboranto



Mi naskiĝis la 26-an de decembro, 1912, en malgranda provinca urbeto Ratono (eksaj orientaj terzonoj de Polujo). Mia patro, Johano, profesie oficisto, estiĝis, ekde jaro 1942, grek-ortodoksa pastro. Mia patrino, Olga, devenas el la urbeto Murawicki kaj estis profesie dommastrino. Mi ankaŭ havas fraton, Olég, sen iu speciala profesio. Kun mia familio mi perdis tute la kontakton ekde jaro 1943. La sorto jetis min for, okcidenten... dum ili restis en ilia loko, en malgranda provinca urbeto Kamien - Koszyrski. Nun tiuj terzonoj apartenas al Sovet-Unio. Mi havas nenian viv-signon pri miaj familianoj.

Mi iĝis esperantisto en la jaro 1932. En tiu jaro mi komencis fervore lerni nian lingvon, allogita de ĝia belega Interna Ideo. Se ne estus tiu ideo, mi neniam lernus Esperanton kiel simple lingvon. Mi konatiĝis kun Esperanto ne pro ĝia genia strukturo, sed pro la en ĝi entenata ideologio — ideologio de Amo, Frateco kaj Paco. Ekde miaj dek ses jaroj mi apartenas al nia movado, batalante kontraŭ ĉiuspecaj,

amase en ĝi ensteliĝantaj lastatempe diversaj, malutilaj por nia Afero, politikaj tendencoj.

Al la demando pri miaj vidpunktoj rilate al Esperanto kaj esperantismo ĝenerale, mi devas konfesi, ke mi ne kredas, ke nia lingvo ludos iam la rolon de plibonigo de la homaro. La homaro ankoraŭ dum longa tempo restos surda al nia belega, mirakla ideo, ĉar ĝi, la homaro, estas malbona, kaj nia tendaro estas ankoraŭ tre malforta por komenci batalon kontraŭ tiu Malbono. Sed mi forte kredas, ke, tamen, iam venos la bona tempo, kiam la homaj koro kaj animo renaskiĝos, iĝos pli bonaj, pli homecaj... kaj tiam la homaro ekkomprenos la signifon de nia lingvo, do, estas ne ILO por forĝadi novan, pli bonan estontecon, pli bonajn tempojn... sed SIGNO de tiuj benotaj tempoj, alvenantaj per si mem. Esperanto estas la signo de la revekiĝantaj animoj kaj rigidaj konsciencoj.

En Esperanto mi komencis verki en la jaro 1936, estiĝante kunlaboranto de la antaŭmilita "Pola Esperantisto", redaktata tiutempe de la fama pola scienculo-bakteriologiisto, prof. Odo Bujvid. Li estis la unua kiu instigis min al verkado, aperigante miajn versaĵojn kaj prozaĵojn en lia revuo. Miaj unuaj noveloj kaj rakontoj, aperigitaj en diversaj revuoj esperantistaj kaj polaj, estis psikologiaj noveloj: "Ĉu mi estas la krimulo?", "Digne", "Neefektiviginta memmortigo", "Strangulo", "El vivo", "La spiono", ape-

rigita en la 11-12-a n-ro de la pasintjara "Literatura Mondo", k.a. Nun estas aperigota, libroforme, mia novel-kolekto en Esperanto "EKO-Centro, Germanujo" kaj en germana lingvo (Tramondo, Aŭstrujo).

Pri Brazilo mi scias tre malmulte. Same pri brazilaj esperantistaj kaj neesperantistaj verkistoj, ĉar mi neniam havis kontakton kun la Nova Mondo. Mi vere estus ĝoja, se miaj brazilaj "profesi-kamaradoj" kontaktus kun mi kaj ekkorespondus pri problemoj de esperantista kaj neesperantista brazila literaturo.

Pere de nia kara RIO ESPERANTISTA mi salutas ĉiujn gelegantojn de nia revuo kaj esprimas sinceran, koran dankon pri pozitiva opinio (laŭ sciigoj de la redakcio) pri miaj verkoj.

S I M O R T I S

Al la
Kor'
Mala
Hor'.

Pala
Flor'
Falas
For'.

Kia
Helo,
Di'!

Plia
Stelo:
Si!

Sylla Chaves.

Cortinas Americanas

**VENEZIANAS
PARA JANELAS
PORTAS E
VARANDAS**

*Ornamentos
Gratis*

TEL. 43-0026
RUA SACADURA CABRAL, 291

NIAJ PERANTOJ EN BRAZILO

SÃO PAULO — Victor Miniero, rua Comandante Salgado, 234, Tatuapé.

PÓRTO ALEGRE — Ary Zamora, rua S. Carlos 1192.

BELO HORIZONTE — D-ro L. de Azeredo Coutinho, rua Carijós, 218, 2.^a etaĝo, ĉambro 25.

MANÁUS — S. Augusto, rua dos Andradas, 76.

SALVADOR — Edgard da Silva Estrela, rua 3 de Maio, 12.

UBERLÂNDIA — Haroldo L. Pinto, Banco Hipotecário de Minas.

SANTOS — F. S. Almada, Banco do Brasil.

FOZ DO IGUAÇU' — Carlos H. Dionisio.

Ĉiuj jam varbis abojantoj por la gazeto, kaj ni esperas ke la varbado en ĉi tiu jaro estos pli granda.

La direktaro de la gazeto decidis ke la PERANTOJ kiuj, prom la varbado, sendos novaĵojn pri la loka movado fariĝos KORESPONDANTO, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ kunlabores per verkaĵoj aŭ tradukaĵoj fariĝos AMBASADORO de RIO ESPERANTISTA.

Kaj ni havas plezuron anonci la unuan KORESPONDANTON: — Baurú — Luiz Bartholomeu, Caixa Postal 2.

Comprar bem Camisas, Robes, vestons e Pijamas

SO' NO

O CAMIZEIRO



Tra La Mondo

NEDERLANDO. — Fondiĝis nova partio nomata "Progresista Partio por Tutmonda Registaro". La kvina celo de la partio estas la jena: Feciligi internaciajn interrilatojn de la popoloj per oficiala instruado de la internacia lingvo en la lernejoj.

HUNGARUJO. — La unua danubvala esperanto-kongreso okazas 22-25 ĉi-monate en Budapeŝto. Partoprenas ĝin la esp. organizaĵoj de jenaj landoj: Hungarujo, Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo, Pollando, Rumanujo. El kelkaj landoj aliĝis unuopaj esperantistoj. Raportanto pri Esperanto en la lernejoj estas hungara samideano, S-ro Ludoviko Kokeny. Pri internacia movado, D-ro Ivo Lapenna, jugoslavo; Pri internacia kulturo, S-ro Ivan Esperov, bulgaro, kaj pri Literatura Mondo, D-ro Kolomano Kalocsay, hungaro.

EGIPTUJO. — Laŭ la organo "Egipta Esperantisto", nia movado progresas en tiu lando. En Kairo, ĉe Y.M.C.A., oni fondis Esperanto-Klubon kie oftĉ okazas festoj kaj kunvenoj, dank'al la klopodoj de S-ro Dinsmore, sekretario pri sociaj aferoj de tiu Asocio. Ankaŭ en Kairo S-ano S. Laleh starigis Esperanto-Kurson ĉe Alta Komercinstituto kun 110 partoprenantoj. Profesoroj Gohar kaj Kasim multe helpas la movadon.

S-ano H. A. Amin klopodas starigi kurson inter la lernantoj de medicina fakultato ĉe Egipta Universitato.

En Aleksandrio, S-ano Ayak gvidas kurson ĉe tiea Y.M.C.A. En Kafr-El-Dawar nia juna samideano, Mohamed Ali Seri, vige propagandas inter la skoltroj kaj aperigas artikolojn por-esperantajn.

FRANCUJO. — S-ro Dusuasoy, la fama konata pariza juvelisto, estis elektita kiel prezidanto de la pariza grupo.

S-ro Paul Hubert, direktoro de la grava optika firmao, Les freres Lissac, reprezentos la francan optikan fakon ĉe la proksima internacia kongreso en Malmö.

En la urbo Fecamp dum la 28, 29 kaj 30-a de majo ĵus pasinta okazis du kongresoj. La Normandia Federacio de la Franca Esperantista Asocio starigis sian kongreson kaj montris belegan ekspozicion provizita de S-ro Saget, el Elboeuf, de li arte prezentita. Tiu ekspozicio montris mirindan kolekton de poŝtmarkoj, kovertoj, erinomarkoj kiuj estis tute aŭ parte verkitaj en Esperanto. La impresoj restis grava. La urbestro, kiu prezentis bankedon, finis sian paroladon per frazoj en Esperanto kaj, tute kompreneble, estis vige aplaudita de la ĉeestantoj.

Ankaŭ la renaskiĝanta Asocio de la Esperantistoj Maristoj starigis sian unuan postmilitan kongreson. S-ro E. Chicot, 24 Avenue Ledru-Rollin, Parizo (12), estis elektita kiel peranto de la Asocio. Dum la kongreso aperis, kiel vizitanto, idisto kiu venis la trezorojn ekspoziciitajn. Li estis aklamita de ĉiuj esperantistoj kiuj ĝojis vidi veran idiston kies raŝo estas preskaŭ ĉie malaperinta. Li mem konfesis, ke li estas tute sola depost la jaro 1922 kaj diras esti tro maljuna por esperantistiĝi nun.

EKSKURSO



La 30-an de majo São Paulo Esperanto Klubo okazigis ekskurson al Jandira (Jandira), belega urbeto proksima al tiu ĉefurbo. La ekskurson partoprenis ankaŭ la hungara Kultur-societo nomata "União Cultural 15 de Março". Ĉeestis multaj personoj kaj la gvidantoj de S.P.E.K. La agrablajn kaj sukcesplenan promenadon gvidis f-ino Valdivia Riemma.

GRAVAJ ESPERANTO-LIBROJ

	Cr\$
Abismoj	20,00
Anstataŭ edzino	40,00
Aventuroj de Marteno Drake	30,00
Baha'u'llah kaj la nova epoko	30,00
Bela Joe (Aŭtobiografio de hundo)	30,00
En Okcidento nenio nova	25,00
Evangelio laŭ Spiritismo — La	40,00
Fundamenta Krestomatio	40,00
Hamleto — tradukis Zamenhof	15,00
Ifigenio en Taurido — tradukis Zamenhof	20,00
Jarmiloj Pasas — Universala historio originale verkita	75,00
Libro de la Spiritoj	50,00
Marta — tradukis Zamenhof	40,00
Petrolo (2 volumoj)	50,00
Patroj kaj Filoj	25,00
Rabistoj — La, trad. Zamenhof	25,00
Revizoro — La, trad. Zamenhof	20,00
Rigardante Malantaŭen	20,00
Sankta Biblio — La	50,00
Vivo de Zamenhof, de Edmond Privat	30,00

* * *

As encomendas deverão vir em nome do tesoureiro da Associação, S-ano M. Barbosa de Mello, e serão enviadas pelo "Reembolso Postal", inclusive de quaisquer outros livros não constantes desta relação.

COLEGIO BRASIL

RUA ASSIS CARNEIRO, 576 — PIEDADE

Tel. 29-6701

Diretor: Prof. J. J. TRINDADE FILHO

Chusos: Preliminar, Primária Geral — Complementar e Dactilografia — Aulas diurnas e noturnas.

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Morais 506-A

Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

A NOVA ERA — A ERA DA MUNDIALIDADE — E O ESPERANTO

Sob o patrocínio da Liga Esperantista Brasileira, o Departamento Cultural do Clube Militar promoveu uma conferência do Dr. M. A. Teixeira de Freitas, no dia 16 de junho, em sua sede social.

O ilustre conferencista foi vivamente aplaudido, por motivo de sua oratória e do modo inteligente pelo qual apresentou o tema: "A nova era — a era da mundialidade — e o Esperanto", que foi subdividido nas seguintes partes:

1 — Três aspirações distintas e um só Ideal verdadeiro. 2 — A linguagem ecumênica. 3 — A

réplica à Torre de Babel. 4 — O Verbo — Voz e Luz da Mundialidade. 5 — A oficialização universal do Esperanto. 7 — A Educação e a Cultura para todos, através do Esperanto. 8 — O Esperanto e a Paz do Mundo. 9 — O Brasil — paladino da Paz e do entendimento universal.

A Associação foi representada pelo seu presidente, tendo comparecido também representantes do Brazila Klubo Esperanto, Esperanto-Klubo da A.C.M. e do Clube Esperantista de Niterói. A sessão foi presidida pelo presidente do Clube Militar.

NOVOS ESPERANTISTAS

Na sede da Federação Espírita Brasileira, a 20 de Junho dêste ano, foram entregues os diplomas aos novos esperantistas que terminaram o curso elementar mantido pela referida entidade.

Presidiu a sessão o Dr. Carlos Lomba dizendo, inicialmente, que a Federação Espírita prestigiava o Esperanto por ser elemento de fraternidade entre os homens.

A cerimônia, realizada perante grande auditório, contou com a presença do Dr. Carlos Domingues, atual presidente da Liga Esperantista Brasileira, bem como de elevado número de esperantistas.

Falaram, com referência ao ato, os diplomandos Placido Esteves Gonzalez e a senhorinha Ives de Oliveira, e, em seguida, o professor do curso, Paulo de Oliveira Ludka.

O prof. Porto Carreiro Neto proferiu conciso discurso, mostrando a utilidade do Esperanto em todos os setores da atividade humana, salientando que os esperantistas do momento preparam um novo mundo para as gerações do porvir.

Registramos, com prazer, os nomes dos novos esperantistas: Alfeu Couto, Antonio Pereira Machado, Arlindo Batista Peixoto, Celeste Valente Lopes, Cleudf Guerra de Oliveira, Clauro Guerra de Oliveira, Hilso de Souza, Ives Guerra de Oliveira, João Guedes Alcoforado, José de Souza Rosa, Oswaldo Rodrigues, Paulo Lopes Rodrigues e Placido Esteves Gonzalez.

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras
Residência: Consultório:
RUA BELA S. LUIZ, 68 R. ASSEMBLEIA, 53-1.
Tel. 48-5892 Tel. 42-3835

ESCOLA DE PORTUGUÊS E ESPERANTO

Na sede da União Espírita Baiana, em Salvador, Estado da Bahia, celebrar-se-á, com muito brilhantismo, o primeiro aniversário da fundação da Escola de Português e Esperanto, da qual é diretora a prof. Maria Luiza S. Pontes. Desde 30 de Agosto do ano passado, data de sua fundação, a referida Escola funciona regularmente, sendo que as aulas de Esperanto são ministradas pelo prof. Hermes Pitta e as aulas de Português pelo jornalista Heitor S. C. Cardoso, respectivamente 2.º e 1.º Secretários da União Espírita Baiana.

Os espíritas da Bahia estão verdadeiramente empenhados na difusão do Esperanto. Ainda há pouco tempo, Dezembro do ano passado, na sede da União Espírita Baiana, o prof. Hermes Pitta proferiu importante conferência sobre o Esperanto. Ao que estamos informados, outras conferências serão realizadas naquela sociedade espírita, onde pontificou o genio de José Petitinga, que foi um dos maiores filólogos da Bahia, poeta e jornalista.

RIO ESPERANTISTA

Propriedade da A.E.R.J.
Um jornal do Rio para o mundo

*
Diretor responsável
Delio Pereira de Souza
Gerente
Wilton Ribeiro
Redator-chefe
Laszlo Zinner
Redatores
Konstanteno Blascikow
D-ro Braz Cosenza

EXPEDIENTE :

As importâncias referentes às assinaturas de RIO ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, sr. Wilton Ribeiro, bem como quaisquer quantias, vales-postais, cheques, etc.

*
La gazeto rajtigas tutan liberon al ĝiaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas pro la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj.

Estas permesata la represo de la artikoloj, ĉu parte, ĉu tute — kondiĉe, ke oni citu la fonton.

~~~~~  
F A R I G U  
S U B T E N A N T O  
D E  
"RIO ESPERANTISTA"  
~~~~~

CAMPANHA ZAMENHOF

Lembramos a todos os esperantistas brasileiros que ainda não tiverem participado da Campanha, que enviem seus donativos, atendendo assim, o instante "Apelo" publicado em RIO ESPERANTISTA, de janeiro dêste ano.

A finalidade de tão importante iniciativa já é conhecida de todos que tiveram a oportunidade de ler a publicação do "Apelo", incerto em RIO ESPERANTISTA, número de janeiro dêste ano, convindo acrescentar que a Campanha, além do que já foi dito, visa, com os donativos que se conseguirem, mitigar, ao menos em parte, o sofrimento de companheiros do mesmo ideal, fazendo sentir aos samideanos da Velha Europa, que nestas plagas da America, corações amigos, enamorados da **Interna Ideo**, sentem a desoladora miséria que ronda não poucos lares dos nossos "gesamideanos" que, verdadeiramente torturados, em missivas constantes, exclamam: "mi estas en plej granda mizero, nutraĵe, samekiel vestaĵe".

Pedimos a todos coidealistas que enviem seus donativos ao signatário desta nota, à Caixa Postal, 3677 — Rio, ou, pessoalmente, aos sábados, das 16 às 18 horas, na sede da Associação, à rua Juan Pablo Duarte (antiga Marrecas), 19, 2.º andar.

Braz Cosenza
Secretário da Campanha.

Nia Konkurso

Multajn respondojn ni ricevis, sed preskaŭ ĉiuj nekompletaj aŭ erarenhavantajn. Nur unu respondo, tiu de samideano Giovanni P. Faraco, el urbo Florianopolis, estas kompleta, kaj ĝi tute certe meritis la unuan premion: "Judoj sen Mono".

La duan kaj la trian premiojn la gvidantoj de la gazeto decidis aljugi al la du pli bonaj respondoj, tiuj de samideanoj E. Garrote, el urbo Rafaela, Argentino, kaj Elidio Taveiros, el urbo brazila, Rio Claro. La premioj konsistas el la libroj "Vivo de Zola" kaj "La Botistoj".

Jen la bonegaj respondoj de S-ano Giovanni P. Faraco:

1. Kiam fondiĝis la Lingva Komitato?

Je la 13-a de aŭgusto, 1905, en Bulonjo. Klarigoj: D-ro Zamenhof deziris liberigi de ĉia respondeco pri la lingvaj aferoj, ĉar li ne volis esti kiel papo en Esperanto. D-ro Kazimir Bein (Kabe) petis al la Unua Kongreso (Bulonja, 1905) la kreon de Centra lingva aŭtoritato. Lin subtenis Bourlet kaj aliaj. Kontraŭbatalis la ideon Cart kaj la amikoj de markizo L. de Beaufront, kiuj opiniis, ke la supera lingva aŭtoritato devus esti oficiala ekstera korporacio, kiu oficialigus Esperanton. Oni petis al D-ro Zamenhof, ke li elektu la plej kompetentajn esperantistojn por ke ili zorgu pri la lingvaj aferoj, sed li rifuzis; li nur proponis liston al la kongreso kaj oni kreis provizoran komitaton "por konsiligi kun D-ro Zamenhof pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo", dum la lasta kunsido de la Kongreso. En 1908 la Lingva Komitato akceptis sian regularon laŭ la projekto de rektoro Boirac (kiu estis la prezidanto proponita de Zamenhof mem); ĝin aprobis la Kvara Kongreso en Dresden. La Provizora Komitato, fondita dum la Unua Kongreso, entenis 95 membrojn, inter kiuj troviĝas 20 francoj, 12 angloj, 7 rusoj, 6 italoj kaj ktp. Braziliano, S-ro A. Caetano Coutinho, estis elektita por tiu Provizora Komitato. El la statutoj: "Esperantista Lingva Komitato estas komisiita zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon".

2. Kiam kaj kiu fondis la Internacian Sciencan Asocion?

"La influo de generalo Sébert regis en la Dua Kongreso. Li deziris konservi la neŭtralecon de la kongresoj. Pro tio li instigis la kunvokon de apartaj fakaj kunvenoj kun propra tagordo kaj respondeco". "El ĉiuj kunvenoj la plej grava estis la scienca, kiun prezidis generalo Sébert kaj sekretario S-ro P. Carlo Bourlet. La Scienca Asocio fariĝis tre grava fako". Ni situas la daton de la fondo de Internacia Scienca Asocio, age de generalo Sébert, inter la 27-a de aŭgusto kaj la 5-a de septembro, 1906, en Genéve.

3. Kiu estis la unua esperantisto en Brazilo?

La disvastigado de Esperanto en Brazilo komencis en la jaro 1905 (Que é o Esperanto? Pg. 18). Sed jam en 1893 (12 jaroj antaŭ) S-ro Francisco V. Lorenz, kiu skribis interesajn artikolojn en Fundamenta Krestomatio, elŝipiĝis en Rio de Janeiro, "pilgrima-dis tra Minas Gerais, São Paulo kaj aliaj ŝtatoj" ĝis atingi urbon S. Feliciano, en ŝtato Rio Grande do Sul, la 8-an de aŭgusto, 1894. Jam en 1890 li verkis Plenan Lernolibron de Esperanto por Ĉeĥoj.

4. Kiu estis la unua prezidanto de Brazila Klubo Esperanto?

Brazila Klubo Esperanto, la dua klubo organizita en Brazilo, havis la jenajn prezidantojn; je la fondiĝo: honoraj prezidantoj- D-ro L. L. Zamenhof, mar-

Lastaj Novajoj

SANTOS. — S-ano Dragutin Wranka faris bonegan prelegon en la ejo de la Sindikato de Bankoficistoj kun la ĉeesto de multaj anoj de la Sindikato kaj esperantistoj de tiu urbo. La prelego brile sukcesis kaj allogis multajn novaj lernantojn. La parolado de S-ano Wranka estis tradukata de S-ano F. S. Almada, fervora esperantisto en tiu urbo, nia peranto kaj kunlaboranto. Pri la prelego raportis ĉiuj gravaj lokaj gazetoj inter ili "A Tribuna" kaj "O Diário", kiu enmetis grandon kliŝon en la raporton.

SÃO PAULO. — Atendante la ŝipon, S-ano Wranka profitis la okazon kaj iris al tiu ĉefurbo por fari en la ejo de Esperanto-Klubo prelegon pri la Cseh metodo. Lin kaj la edzinon akompanis santos'aj esperantistoj gvidataj de S-ano Almada kiu denove tradukis la vortojn de S-ro Wranka en portugalan lingvon. La kunveno ĉeestis multajn neesperantistojn kaj la sukceso, kiel ĉiam, estis vere granda.

Ankaŭ restis en São Paulo dum du semajnoj nia ĉefredaktoro, S-ro Laszlo Zinner. Profitinte la okazon li faris paroladon pri la antaŭnelonge mortinta hispana skulptartisto, Don Mariano Benlliure, kun kiu li kune laboris en Madrid dum du jaroj. La kunveno ĉeestis multajn esperantistojn kaj la paroladon raportis gazetoj de tiu urbo. La plej granda tagjurnalo "A Gazeta" aperigis kliŝon de la parolinto.

Fondiĝis en tiu urbo la "Ping-Pong" Sport-Klubo kies fervoraj anoj estas geesperantistoj kaj inter ili la gvidantoj estas fraŭlinoj Astrogilda kaj Norma Guerini.

NATAL. — Nia samideano Arlindo Castor de Lima sciigas al ni jenon: Pro la bonvolaj klopodoj de S-ro Ramildo Gurgel kaj S-ro Dtoniel Menezes, fama nord-brazila poeto kaj kunlaboranto de la gazeto "A Republica", nia S-ano, Arlindo Castor de Lima, starigis esperanto-kolonon, ĉiudimane, en la citita tagjurnalo. Korajn gratulojn al ili.

BELO HIROZONTE. — Nia samideano, Aldino de Freitas, kiu troviĝas nun en sanatorio pro malsano, feliĉe jam fartas pli bone kaj salutas ĉiujn liajn geamikojn kaj korespondantojn.

RIO DE JANEIRO. — Por efektiviĝi art ekspozicion en São Paulo, S-ano Laszlo Zinner transloĝos al tiu ĉefurbo kaj tie restados dum kelkaj monatoj. Li ekspozicios la desegnojn de li faritaj en Nord-Afriko dum la militjaroj kaj ankaŭ diversajn skizojn faritaj en Madrid kaj Barcelono. Ankaŭ li ekspozicios la skulptaĵojn farotajn en São Paulo, inter ili la buston de la guberniestro, S-ro Adhemar Pereira de Barros, kiu patrocinos la ekspozicion. Tamen S-ano Zinner daŭrigos kiel nia ĉefredaktoro pere de korespondado.

kizo de Beafont kaj Murilo Furtado. Efektiva prezidanto — D-ro Everardo Backheuser, vic-prezidantoj: 1-a, D-ro Nuno Baena, 2-a, S-ro Nerval Gouvêa.

5. Kiu esperantigis la libron **INFERO** de Dante? **INFERO** de Dante, el la itala lingvo tradukis S-ro K. Kalocsay. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt, 1933 (Je la Pentekosto). "Ne ekzistas aŭtoro pli malfacile tradukebla ol Dante" diras S-ro Kalomano Kalocsay en la antaŭparolo de la tradukaĵo. S-ro Kalocsay kreis novajn vortojn, ekzemple; stinki (malbonodoro), kaj aliaj el **PARNASA GVIDLIBRO**: olda (maljuna), outino (publikulino), latrono (ŝtelegisto), bestio (sovaĝbesto), infra (malsupra) ktp. La libro enhavas biografion pri la vivo de Dante.

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Delio Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 20,00
Exterior — U\$ 1,50
Ou 15 Coupões-resposta
Avulso — Cr\$ 2,00

Rio de Janeiro, JULHO, 1948

ANO II — Edição mensal — N.º 16

Enderço: Caixa Postal 3677

Redação e administração
Rua das Marrecas, 15 2.º and
Telefone 22-5300

DRAGUTIN WRANKA

Vojaĝante el Jugoslavujo al Ĉilo, restis inter ni dum pli ol du monatoj la geedzoj Wranka.

Profesoro Dragutin Wranka estas unu el tiuj revantoj kiuj metas idealon multe pli alten ol iliajn interesojn. Lia plej granda revo estas la internacia lingvo kiun ni, esperantistoj, ĉiuj kredas esti signo de la nova, alvenanta epoko.

Granda propagandisto de la rekta metodo CSEH, li profitis la prokraston de la ŝipo kiu kondukos lin al Punta Arenas, en Ĉilo, por malfermi la rektmetodan kurson ĉe la Sindikato de la Bankoficistoj, kurso ĵus finiginta sub la gvidado de nia samideano Nelson Pereira de Souza.

Doktoro Carlos Domingues, prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, prezentis sinjoron Wranka en la lernejo Pedro, la Dua, kie li faris lertan demonstracion pri la citita metodo. La rezultato de tia laboro estis tre fruktodona. Granda nombro da gelernantoj, ravitaj de la beleco kaj utileco de Esperanto, sin enskribis partopreni la kurson kiu estas malfermita en tiu lernejo post la nuna libertempo.

Ankaŭ en Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko, kun la ĉeesto de nia ŝatata veterano, S-ro Ismael Gomes Braga, S-ro Wranka faris entuziasmigan pruvon pri la lernigo de nia lingvo per la Cseh-metodo.

Denove la sukceso estis plena. Komence li parolis pri



S-ro D. Wranka kaj la edzino promenadis al la monteto "Corcovado" (legu Korkovado) kune kun sia lernanto, S-ro José Moreira, kaj lia edzino. En la fundo oni vidas la statuego de "Cristo Redentor". Interese estas rimarkigi ke S-ro Moreira estis lerninta la lingvon de 4 semajnoj, kaj ili ĉiuj pasigis kune la tutan dimanĉon, parolante nur Esperante, kio montras la taŭgecon de la Ĉe-metodo. Oni vidas de maldekstre S-ro José Moreira, S-inoj Wranka kaj Moreira, kaj S-ro Wranka.

la efikeco de Esperanto kiel ilo por la alproksimiĝo de la popoloj. Kiel vivanta ekzemplo de tiu certigo li prezentis sin mem, tute feliĉa ĉe brazilaj geesperantistoj, dank'al Esperanto. Lian paroladon tradukis al la ĉeestantoj samideanino Maria Malheiro.

Fine, en Brazila Ligo Esperantista, S-ro Wranka fermis, per ora ŝlosilo, sian mallongan sed brilan restadon

en Rio. En tiu neforgesebla vespero li prezentis al ni, dum la plej signifplena kunveno, kunveno de li dediĉita al novaj instruistoj, kiuj, allogitaj de la ĉarma facileco de la metodo Cseh, decidis daŭrigi kaj disvastigi ĝin en Brazilo.

Estis, ja, la lastaj instruoj de la adiaŭanta Majstro al siaj disĉiploj!...

Cseh-Metodo

Dum sep jaroj ni instruas Esperanton kaj de sep jaroj ni serĉas la plej taŭgan metodon. Ekde unua kurso ni rimarkis, ke la duono (kelkfoje eĉ la plimulto) de la lernantoj ne finas ĝin. La lernado fariĝas enuiga kaj tediga kaj... ili ne plu aperas. La lernolibrojn ni ŝanĝis unu post la alia kaj el ili ni provis ĉiujn eblajn; allogilojn ni serĉis kaj metis en la kursojn: korespondadoj, poŝtmark-kolektado, revuoj ktp. F'infine ni venis al la konkludo, ke netaŭga estis la metodo kaj ne la lernolibroj ĉar ni ĉiam uzadis la gramatikon t.e. la nerektan metodon.

Ni, do, decidis ekprovi la rektan metodon kiu, pro tio ke ĝi estas paroliga, forigas la naturan ektimon paroli ankoraŭ nekonatan lingvon kaj nur poste instruas la gramatikon. Ni neniam lernis lingvon pere de rektametodo, tamen ni edicidis provi kaj komencis tian kurson. Sed, sen gvidilo la afero estas tre malfacila kaj nia kurso restis nekompleta.

Kaj jen venis al ni la solvo: venis al Rio S-ro D. Wranka, kiu faris kurson per la Cseh-metodo. Tio estis ja la delonge serĉita metodo. Taŭga, amuziga kaj alloga ĝi estis. La sukceso estis granda kaj ni, kompreneble, tuj decidis ĝin ekuzi.

Tion ni faris kaj la rezultato estas entuziasmiga: granda amaso da personoj venas al nia movado kaj ni jam povas efektiviigi multajn planojn kiuj naskiĝis kune kun la Asocio. Tion jam delonge ni bezonis!

La lernantoj ĉe la Bankoficista Sindikato profitis la okazon transdoni al nia meritplena vizitanto belan memordonacon.

Fakte, la restado de samideano Wranka en Rio de Janeiro malfermigis en nia movado novan kaj pli vigan fazon.

Ekde nun, ni kredas, ĝia evoluado estos pli rapida inter ni, brazilanoj.

Al la geedzoj Wranka RIO ESPERANTISTA deziras la plej sinceran feliĉon en ilia nova vivosfero kiu ilin atendas.